

## ILI FORLISIS ĈION KAJ SEKVIS LIN

*Lk. 5, 1-11*

**En tiu tempo, dum la homamaso ĉirkaŭpremis lin kaj aŭskultis la vorton de Dio, Jesuo staris apud la lago Genesaret; kaj li vidis du ŝipetojn starantajn apud la lago, sed la fiŝkaptistoj ĵus eliris el ili, kaj lavis la retojn. Kaj li eniris en unu el la ŝipetoj, kiu apartenis al Simon, kaj petis, ke li forŝovu iom for de la bordo. Kaj li sidiĝis, kaj instruis la homamason el la ŝipeto.**

**Kaj kiam li ĉesis paroli, li diris al Simon: “Forŝovu ĝis la profundo, kaj mallevu la retojn por akirado”. Kaj responde Simon diris: “Estro, ni jam laboris la tutan nokton kaj kaptis nenion; tamen laŭ via diro mi mallevos la retojn”. Kaj tion farinte, ili enfermis grandan amason da fiŝoj, kaj iliaj retoj ekrompiĝis; kaj ili geste signis al siaj kompanianoj en la alia ŝipeto, ke ili venu kaj helpu ilin. Kaj ili venis, kaj plenigis ambaŭ ŝipetojn, ĝis ekprofundiĝo.**

**Sed Simon Petro, tion vidinte, falis teren antaŭ la genuoj de Jesuo, dirante: “Foriru de mi, ho Sinjoro, ĉar mi estas pekulo”. Ĉar pro la preno de fiŝoj, kiun ili akiris, miro kaptis lin, kaj ĉiujn, kiuj estis kun li, kaj tiel same Jakobon kaj Johanon, filojn de Zebedeo, kiuj estis kompanianoj de Simon. Kaj Jesuo diris al Simon: “Ne timu; de nun vi estos kaptisto de homoj”.**

**Kaj kiam ili surbordigis siajn ŝipetojn, ili forlasis ĉion, kaj sekvis lin.**

Por kompreni la ĉi dimanĉan evangelipecon el la Evangelio laŭ Sankta Luko ni devas referenci al la profeto Jeĥezkel kiu, en la ĉapitro 47a de sia Libro, vidas akvon elirantan el la templo de Jeruzalemo kiu descendas ĝis la maro, ĝi lin resanigas kaj tio okazigas abundan fiŝkaptadon.

Aparte ĉe la versego 10a la profeto skribas: “Kaj staros apud ĝi fiŝkaptistoj de En-Gedi ĝis En-Eglaim, kaj ili etendos tie retojn; iliaj fiŝoj estos tiaspecaj, kiel la fiŝoj de la Granda Maro, kaj tre multe”. Do tiu estas la citaĵo kiun la evangeliisto prenas kiel fonon por sia rakontado.

Nu, Sankta Luko skribas ke: “la homamaso ĉirkaŭpremis Jesuon por aŭskulti la vorton de Dio”, ni vidos poste ke okazas transmeton kaj tiu vorto de Dio fariĝas vorto de Jesuo, ĉar Jesuo ne estas iu sendito de Dio, sed Jesuo estas Dio mem.

“Jesuo, starante apud la lago Genesaret, vidis du ŝipetojn starantajn apud la lago, sed la fiŝkaptistoj ĵus eliris el ili, kaj lavis la retojn”. Jen tiu estas la kunteksto kies fono estas la profetaĵo de Jeĥezkel: la fiŝkaptistoj kun iliaj retoj.

“Li eniris en unu el la ŝipetoj, kiu apartenis al Simon”; Jesuo jam konas Simonon ĉar li jam resanigis lian bopatriron. “Li petis, ke li forŝovu iom for de la bordo. Kaj li sidiĝis, kaj instruis la homamason el la ŝipeto. Kiam li ĉesis paroli, li diris al Simon: “Forŝovu ĝis marmeze”- laŭlitere” ĝis la profundo” - “kaj mallevu viajn retojn por akirado”.

Estas Jesuo, estas Dio mem kiu parolas. La reago de Simono estas tiu, li ne nomas Lin Majstro, kiel diras la traduko, sed la greka termino *υπίστατα* (Epistata) signifas ĉefo, estro, dum majstro oni alparolas *διδάσκαλος* (Didaskalos), do Simono konsideras Jesuon kiel estron, kiel gvidanton al kiu li povas kaj devas sin submeti. Kaj li protestas: “Ni jam laboris la tutan nokton”, ‘la tutan nokton’ en la Evangelio tiu esprimo neniam havas nur kronologian senco, sed ĝi ĉiam signifas mallumon, malhelpon akcepti la Sinjoron; “Kaj ni kaptis nenion; tamen laŭ via diro”, jen la vorto de Dio kiu fariĝas la vorto de la Homo, “mi mallevos la retojn”.

Nu, la abunda fiŝkaptado estas konstanta elemento en la homa aktiveco kiam ĝi fariĝas laŭ la vorto de Jesuo. Fakte la evangeliisto skribas, “Kaj tion farinte, ili enfermis grandan amason da fiŝoj, kaj iliaj retoj ekrompiĝis”.

“Tion vidinte”, daŭrigas poste la evangeliisto, “Simono” kaj ĉi tie li estas nomata Petro; tiu estas la unua fojo en la evangelio laŭ Sankta Luko. Tiu ĉi disĉiplo nomiĝas Simono; li havas negativan kromnomon; “Petro”, kiu signifas la obstinkapa, la malcedema homo, kaj neniam, krom ununura fojo, Jesuo sin turnas al tiu disĉiplo nomante lin Petro, Li ĉiam nomas lin Simono.

Laŭ literatura skemo, estas la evangeliistoj kiuj, kiam tiu ĉi disĉiplo kondukas bone lin indikas nur per la nomo, kiam li ŝanceliĝas, kiel ĉikaze, ili indikas lin kiel Simonon kaj pere de la negativa kromnomo Petro, kiam li komplete kontraŭas ili nomas lin nur Petro, nome “la obstinkapa homo”.

Do, jam la evangeliisto komprenigas tion al ni per tiu kromnomo... ĉi tie Simono estas faranta ion maltaŭgan... Fakte li terenfalas antaŭ la genuoj de Jesuo dirante: “Sinjoro”, jen ĉi tie jam estas progreso. Li antaŭe sin turnis al Jesuo nomante lin “estro, ĉefo, gvidanto”, nun li rekonas en Jesuo la Sinjoron.

Tamen li diras: “Foriru de mi, ho Sinjoro, ĉar mi estas pekulo”. Nu, falinte en kontraŭdiron kun la misio de Jesuo kiu diros ke li venis alvoki la pekulojn, do, Petro estas viktimo de religia tradicio pro kiu la pekulo devas esti forpuŝata de la Sinjoro, oni devas lin forpuŝi. Li ne komprenas ke Jesuo, Dio venas alporti amon al ĉiuj, ankaŭ al la pekuloj.

Nu, la konkludo de la epizodo estas ke al Simono aliĝas “same Jakobon kaj Johanon, filojn de Zebedeo” “kaj Jesuo diris al Simono: “Ne timu”. Do la rilato de Jesuo kiu estas Dio al la homo, al la pekulo, ne estas plu baziĝita sur timo, ne estas plu iu kiu timas punon, kiu sin sentas timigita, sed tiu rilato baziĝas sur amo. “Ekde nun vi estos”, kaj tie, strangĝe, la traduko diras: “kaptisto de homoj”, sed la evangeliisto ne uzas la vorton fiŝkaptisto kiel faras Sankta Mateo kaj Sankta Marko, laŭlitere li diras: “vi kaptos vivantajn homojn”.

Estas klare, la signifo estas tiu de la fiŝkaptado, sed ĝin tiu transiras. Kiu estas la signifo kiun la evangeliisto volas doni al tiu vorto? Kapti vivantajn homojn, ĉi kaze, similas la agon de fiŝkaptisto dum eltiri la fiŝojn el la akvo signifas ilin eltiri el ilia natura vivloko por ilin mortigi, eltiri homon el la akvo, kapti el la akvo vivantan homon signifas malhelpi lin morti, ĉar en la maro, en la lago la homo dronas.

Do, Jesuo ne invitas la disĉiplojn, ĉi kaze Simonon esti sanktulo, nome pripensi sin mem, sed Jesuo invitas lin kapti vivantajn homojn, nome eltiri la homojn el tiuj situacioj kiuj povas ĝismorte endanĝerigi ilin. Ne zorgi pri si mem, sed zorgi pri la aliuloj.

Kaj la evangeliisto finas dirante: “Kaj kiam ili surbordigis siajn ŝipetojn, ili forlasis ĉion, kaj sekvis lin”. Do, okazas tuta ŝanĝo en la skalo de la valoroj kiun ankaŭ la aliaj disĉiploj aprobis kaj akceptis.

